Svisa Esperanto-Societo

# informas

SES informas n-ro 1, aprilo 2019

## Svisaj Esperanto-Tagoj
## 4-an kaj 5-an de majo 2019
## en Belinzono, Tiĉino

### Ĝenerala kunveno de Svisa Esperanto-Societo
### 5-an de majo 2018, 14h00 Casa de Popolo, Belinzono

Programo

Sabaton, 4-an de majo 2018

09h-13h00
Vizitado de la merkato de Belinzono
Ĉiun sabaton okazas matene en la urbocentro de Belinzono la fama loka merkato. Ni rekomendas al tiuj, kiuj jam alvenas vendrvespere aŭ matene, viziti tiun merkaton proprainiciate.

13h00-14h00
Komuna tagmanĝo en la restoriacio Casa del Popolo (Viale Stazione 31) [aliĝo ne necesas]

14h00-16h00
Ĉiĉeronado kun d-ro Tazio Carlevaro tra la historia urbo de Belinzono. Tazio Carlevaro estas sperta ĉiĉerono kaj altnivela esperantisto kaj ĝoje prezentas al vi sian hejmurbon kaj ties riĉan historion.

18h00-20h00
Vespermanĝo en Casa del Popolo (bonvolu aliĝi, por rezervi lokon).

20h00-22h00
Vitra salono en Casa del Popolo: Prelego de Mirejo Grosjean pri «bano, duŝo, vestolavado kaj necesejoj tra la mondo» kun multaj fotoj.

(Por la Svisa Esperanto-Ĥoruso sabatvespere ek de la 18h00 estas rezervita la salono 2 por ekzercado.)




Foto: Casa del Popolo, Belinzono

(Daŭrigo sur paĝo 2)

(Programo, Belinzono, daŭrigo de paĝo 1)

## Dimanĉon, 5-an de majo 2018
(Casa del Popolo, Viale Stazione 31)

10h00-10h50
Mirejo prezentas Aikidon kun ekzercoj por ĉiuj.

11h10-12h00
Feri Mazlum el Askono parolas pri la historiaj rilatoj inter la baha-anoj kaj la esperanto-movado. La prelego okazas en la itala kun sinsekva traduko al Espranto fare de Dietrich Weidmann.

12h00-14h00
Tagmanĝo en la restoriacio de Casa del Popolo. (Bonvolu nepre aliĝi por rezervado de la sidlokoj.)

14h00-14h15
Kanta prezentado de la Svisa Esperanto-Ĥoruso por krei bonan etoson por la ĝenerala kunveno.

14h15-16h00
Ĝenerala kunveno de Svisa Esperanto-Societo.

16h00-16h15
Kanta prezentado de la ĥoruso por konkludi la ĝeneralan kunvenon.

16h15-18h00
Libera babilado kun ebleco mendi kafon kaj aliajn trinkaĵojn.

18h00
Vespermanĝo en Casa del Popolo. (Bonvolu aliĝi por rezervado de loko). Post la vespermanĝo eblas libere babili, ĝis la restoracio nokte fermiĝos.

✂-----------------------------------------------------------

**Aliĝilo por la SES-tagoj 2019:**

Antaŭnomo: ______________________________

Familia nomo: ____________________________

Telefono: ________________________________

Retpoŝto: ________________________________

Mi aliĝas por:
☐ Vespermanĝo 4-an de majo
☐ Tagmanĝo 5-an de majo
☐ Ĝenerala kunveno 5-an de majo
☐ Vespermanĝo 5-an de majo

Mi estas veg(etar)ano: ☐ jes / ☐ ne

Sendu vian aliĝon retpoŝte al:
ses-informas@esperanto.ch
aŭ helikopoŝte al:
Esperanto, Poŝtfako 26, 8613 Uster 3



# Tagordo de la ĝenerala kunveno 2019
# Dimanĉon, 5an de majo 2019, 14h15
# Casa del Popolo, Belinzono

1. Bonvenigo, kontrolo de ĉeestantoj kaj anonco pri senkulpiĝoj.
2. Aprobo de la tagordo.
3. Elekto de protokolanto
4. Elekto de voĉnombrantoj
5. Evoluo de la membraro. Mortis nia honora membro Willy Nüesch
6. Aprobo de la protokolo de la ĝenerala kunveno 2018
7. Vivo de la societo : aprobo de la estrarraporto
8. Financoj. Prezento de la jarkalkulo kaj aprobo de ĝi.
9. Elekto de la estraro: La nunaj estraranoj estos je dispono por plia jaro ĝis la ĝenerala kunveno 2020. Sen sinpropono de aliaj kandidatoj, la estraro proponas longigon de la nuna mandato ĝis 2020 kun novelektoj dum la ĝenerala kunveno 2020.
10. Elekto de kaskontrolantoj
11. Elekto de honoraj membroj de SES.
12. Proponoj de membroj
13. Projektoj por 2019
14. Fikso de la loko por la ĝenerala kunveno 2020
15. Nia retejo, nia voĉo.
16. Buĝeto 2020 Prezento kaj aprobo.
17. Diversaĵoj

**<u>Hoteloj en Belinzono</u>**

Atentu, se vi emas trankokti la 4-an kaj 5-an de majo 2019 en Belinzono, bonvolu mem rezervi vian hotelĉambron. Estas pli ol 50 hoteloj en Belinzono kaj proksimeco. Vi trovas la adresojn sub www.local.ch

https://tel.local.ch/de/q?what=Hotel&where=Bellinzona&rid=iKwI

# Estrar- kaj jarraporto de Svisa Esperanto-Societo por 2018

**Membraro**.
SES nombras **160** membrojn je la fino de la jaro 2018 (Kompare al 151 fine de 2017). Inter ili estas **6** junuloj.

Honoraj membroj de SES estas tri: Lucienne Dovat, Claude Gacond kaj Nicole Margot.

Dum 2018 forpasis nia honora membro Willy Nüesch. Dietrich Michael Weidmann ĉestis kiel reprezentanto de SES la funebran ceremonio la 10an de septembro en Hombrechtikon. SES donacis honore al Willy Nüesch, kiu tradukis en senlaca labro multnobrajn verkojn de Goethe, Schiller, Gotthelf, Morgenstern kaj Rudolf Steiner al Esperanto kaj mem eldonadis ilin.

**Financoj**
Nia jarkalkulo 2018 finiĝis per deficito de CHF 3118,65. Tiu deficito parte ŝuldiĝas al la fakto, ke signifa nombro da membroj al ni ankoraŭ ŝuldas kotizojn. La estraro tial petas, tiujn, el inter vi, kiu dum 2018 ne ĝiris sian kontribuon, tion fari en la venontaj tago per bank- aŭ poŝtĝiro aŭ kontante al nia kasistino dum la ĝenerala kunveno. Aliflanke la estraro dankas al tiuj membroj, kiuj per siaj malavaraj donacoj (ankaŭ ĉi-jare CHF 1310,00) subtenis nian asocion.

**Aktivecoj de la estraro**
La estraro kunvenis plurfoje skajpe kaj fizike kunsidis la 14an de aprilo. Ankaŭ estis pluraj duflankaj renkontiĝoj de la du gekunprezidantoj Grosjean kaj Weidmann inter alie ankaŭ dum la UK en Lisbono, kie ankaŭ ĉeestis Sonia Daubercies.

**Ĝenerala Kunveno 2018**
Nian ĉi-jara ĝeeneralan kunvenon la 14an de aprilo 2018 gastigis la lokaj esperantistoj de Ĝenevo en la salono Castafiore, kie okazas la jam tradiciaj Kastaj Festoj de ĝenevaj esperantistoj.

**Festivalo de la Tero en Laŭzano**
La 8-an ĝis 10a de junio SES subtenis standon pri Esperanto organizita de Sonia Daubercies dum la Festivalo de la Tero en Laŭzano.

**102-a UK en Lisbono, Portugalio**
Dum la UK en Lisbono partoprenis XX personoj el Svislando. La kunprezidanto Dietrich Michael Weidmann reprezentis Svisan Esperanto-Societon en la komitato kaj kiel reprezantino de ILEJ ankaŭ nia kunprezidantino Mieille Grosjean partoprenis la komitatan laboron. SES havis standon dum la movada foiro la unuan kongrestagon, kie ni prezentis nian revuon Svisa Espero kaj la diversajn librojn, kiuj estis publikigitaj en la lastaj jaroj kun subteno de SES.

**SES informas**
Aperis du 2018 kiel planite du numeroj de SES informas.

**Svisa Espero**
Por ŝpari kostojn kaj laboron, ni reduktis la aperritmon de Svisa Espero de du al unu eldono, kiu aperis fine de oktobro kun titola tempo pri la kampanjo #nerubu.

**Svisa Kalendaro kaj retejo de SES**
La kunprezidanto Dietrich Weidmann regule ĝisdatigis la svisan kalendaron, kiu raportas pri la lokaj kaj naciaj Esperanto-eventoj en Svislando. Estus granda helpo, se la lokaj aktivistoj sendos la informojn pri siaj eventoj ĝustatempe – se eble laŭ la modelo, kiel la informoj aperas en la kalendaro – per retpoŝto al ses-informas@espranto.ch

Vi trovas la kalendaron sub:

http://esperanto.ch/kalendaro

**Fejsbuko**
SES havas propran paĝon en Fejsbuko, kie aperis regule informoj pri eventoj en Svislando. Krome SES administras ankaŭ la diskutgrupon Esperanto Svislando Switzerland, en kiu membras intertempe pli ol cent personoj. Administrantoj de la paĝo estas ambaŭ kunprezidantoj de SES. Esperanto-Societo Zuriko kaj Laŭzana Espranto-Societo disponas pri propra fejsbukpaĝo kaj ankaŭ estas fejsbukpaĝo aparta por Svisa Espero.

**Instagramo**
La kunprezidanto lanĉis sub sia voknomo DidiWeidmann mikroblogon en Instagramo, kiu fine de la jaro havis jam 1600 abonantojn. Tie Weidmann publikigas Esperanto-kurson «Lernu Esperanton kun Superhundo» en formo de 1-minutaj filmoj, kiun aktuale jam regule sekvas pli ol 300 personoj sur Instagramo kaj proksimume simila nombro tra Facebook kaj Twitter.

**Privataj blogoj de la kunprezidantoj**
Ambaŭ kunprezidantoj publikigas en siaj privataj blogoj regule (Dietrich Weidmann sru informejo.com kaj Mireille Grosjean sur . http://mirejo3.blogspot.com/) informojn.

**Yahoo-diskuto-grupo Svislando**
Grava informkanalo ankaŭ dum 2018 estis nia jahudiskutgrupo Svislando, kie multaj membroj vigle partoprenis.

**Eldona agado**
Dum la pasinta jaro 2018 SES ne eldonis librojn, sed bone evoluas la vendado de la libroj produktitaj en 2016 kaj 2017 (Sonoril-Urĉjo, L'Oiseau, Fahrtrichtung Esperanto) en kunlaboro kun Allsprachendienst Esperanto GmbH. Por 2019/2020 ekzistas ideoj kaj planoj por novaj eldonoj.

**Jutuba kanalo SvisRaporto**
Nelida Weidmann en sia jutuba kanalo SvisRaporto (https://www.youtube.com) ankaŭ dum 2018 publikigis plurajn filmojn pri la Esperanto-vivo en Svislando kaj aparte ĉiu-tagan raportadon dum la Universala Kongreso de Espranto en Lisbono.




**Gazetaro, televido kaj radio**
Ankaŭ dum 2018 mencioj pri Esperanto regule aperis en la tradiciaj amasmedioj, jen kelkaj ekzemploj:
La 26-an de majo 2018 aperis ĉe la svisa radio en Regionaljournal Bern-Fribourg je la 16h41 4-minuta elsendo pri Parzival' kaj Esperanto. La elsendo estas trovebla en la retejo de la sivsa radio sub:
https://www.srf.ch/news/regional/bern-freiburg-wallis/bieler-stadtoriginal-parzival-friedensaktivist-und-schraeger-vogel
Ankaŭ en Der Bund aperis artikolo la 4-an de majo sub la titolo „Die Mission des Weltoriginals". La artikolo legeblas sub:
http://www.edition-hausamgern.ch/bonantagon/medien/20180504_derBund.pdf
La 14-an de aprilo 2018 aperis en la papera eldono de Arc Info, la taga ĵurnalo de la regiono Neŭŝatelo kaj La Chaux-de-Fonds, ampleksa artikolo pri Esperanto ĝenerale sub la titolo „Point de Vue".
La 17-an de majo aperil en la svisa retrevuo nau.ch ampleksa kaj favora artikolo pri Esperanto. Ĝi legeblas sub:
https://www.nau.ch/lifestyle/diy/esperanto-als-eine-sprache-die-welt-vereinen-sollte-65339675

# El regionoj kaj lokaj kluboj

### CDELI La Chaux-de-Fonds

En CDELI ĉiu-monate okazadis la tradiciaj studsabatoj kun kursoj je tri niveloj.

### Agadoj de lokaj grupoj

### Laŭzano

Laŭzana Esperanto-Societo estas sendube la plej vigla loka Esperanto-klubo en Svislando. Ĝi regule kunvenadas la unuan lundon en la monato en sia klubejo Espace Dickens kaj krome en po du studgrupoj (orienta kaj okcidenta).

Elstara agado de la laŭzanaj esperantistoj estis la produkatdo de la filmo «La Magia Lando». La filma agado de la produktejo Nandir sub la gvidado de François Randin en Laŭzano jam havas tradicion. Ekzemple en 2016 kun la premiita filmo „Tetaso amas vojaĝi“. La praprezento de La Magia Lando okazis la 20an de oktobro 2018 en Espace Dickens en Laŭzano.

### Bazelo

Esperanto-Societo Bazelo renkontiĝas regule en la trilanda regiono kun la grupoj el Mulhouse (Francio) kaj Weil am Rhein (Germanio). Ilia bulteno kun programo legeblas sub http://esperanto.ch/bazelo

### Berno

En septembro en la Lingva Kinejo en Reitschule en Bern estis prezentita la filmo „La Universala Lingvo“ en Esperanto. Ĉeestis la prezentadon pluraj esperantistoj.

### Bielo

Ĉiun ĵaŭdon okazas ek de la 16h00 en la restoracio de la Migros-Merkato Kreuzplatz Bielo (Centro Brügg) la ronda tablo de la Mondregistaro, kie Parzival‘ instruas Esperanton kreante Espero-monon. Tiun tablon dum 2018 partoprenis plurfoje ankaŭ la mondfama skulptisto Thomas Hirschhorn.

### Ĝenevo

En Ĝenevo aktivas du grupoj, nome la lunda grupo, kiu ĉiun lundon renkontiĝas en la restoracio Galica apud la stacidomo Cornavain kaj alifalnke la esperantistoj ĉirkaŭ la familio Sans, kiu regule organizas la jam famajn Kastajn Festojn en la salono Castafiore. En aprilo dum la Kasta Festo estis gastigita la ĝenerala kunveno de Svisa Esperanto-Societo.

### La Chaux-de-Fonds

Krom la jam menciitaj studsabatoj kaj diversaj aliaj aktivecoj en CDELI en La Chaux-de-Fonds okazadis diversaj aliaj aktivecoj. Menciindas la lingva kafejo inicita de Mireille Grosjean en la restoracio Citérama. Mencion meritas ankaŭ la plej diversaj aktivecoj en Kultura Centro Esperantista kaj la 23-an de aŭgusto en la Lernejo Granda Ursino, en kies instruprogramo Esperanto estas instruita al infanoj, okazis prelego de la japana Oomoto-majstro Tanaka.

### Soloturno

Dum la Soloturna Filmfestivalo en januaro Parzival‘ jam tradicie starigis sian „Etan tablon de la mondregistaro“, ĉe kiu li informas pri Esperanto kaj la taskoj de la klimatosoldatoj de sia mondregistaro. Dum la ĉi-jara filmfestivalo inaŭgura filmo estis montrita dokumenta filmo de la juna, svisa reĝisoro Christian Laubacher pri Parzival‘.

### Zuriko

La esperantistoj en Zuriko regule renkontiĝas por kafo-klaĉo en restoracio Mishi apud la stacidomo Zuriko-Stadelhofen. La 22an ĝis 25a de novembro la firmao Allsprachendienst Esperanto GmbH prezentis dum la WIR-foiro en la Messe Zürich standon kun la Esperanto-libroj de Esperanto-librejo Zuriko.

La supre menciitaj eventoj kaj okazaĵoj estas nur selekto de la bunta Esperanto-vivo en Svislando. Estrarraporto de SES certe ne sufiĉas por raporti pri ĉio, mi tial petas pardonon, se via evneto ĉi-tie mankas. La estraro de SES tial invitas vin raporti pri ĝi en nia jahu-diskutgrupo kaj en la fejsbukpaĝo de Svisa Esperanto-Societo:
https://www.facebook.com/SvisaEsperantoSocieto
kaj la fejsbukgrupo esperanto-svislando-switzerland:
https://www.facebook.com/groups/Svislando/




#esperantokunsuperhundo

## Kotizoj por SES 2019

| | |
|---|---|
| Plenkreskuloj ek de 30 jaroj | CHF 35.- |
| Paroj ek de 30 jaroj | CHF 50.- |
| Junuloj de 19 ĝis 29 jaroj | CHF 20.- |
| Infanoj ĝis 18 jaroj | CHF 10.- |
| Patronoj | CHF 70.- |
| Nuraj abonantoj de SES informas | CHF 25.- |

Kotizojn pagu al la poŝtkonto de Svisa Esperanto-Societo, 2300 La Chaux-de-Fonds:

**Poŝtkonto: 17-581908-4**
**IBAN CH95 0900 0000 1758 1908 4**

Adreso de Svisa Esperanto-Societo:
Poŝtfako 9, CH-2416 Les Brenets

Estraro de Svisa Esperanto-Societo:
Mireille Grosjean + Dietrich M. Weidmann (kunprezidantoj), Luc Allemand (protokolanto, junularo), Sonja Daubercies (estrarano), Oxana Grazhdanova (kasistino)

## Alvoko al pagado de la kotizo por 2019

Karaj membroj

Jam pasis denove jaro kaj alproksimiĝas jam la ĝenerala kunveno 2019. Tial estas tempo por ĝiri vian kotizon por la aktuala jaro. La societo povas nur ekzisti kaj fari sian laboron favore al Esperanto, se vi, la mebroj per viaj kotizoj kaj malavaraj donacoj tion ebligas. La kasistino samtempe petas vin, por la kotizado, se vi tion povas, utiligi bank- aŭ poŝtĝirkonton, ĉar por kontantaj pagoj ĉe la poŝtgiĉeto la poŝto deduktas monon de nia konto. Se vi pagas ĉe la poŝtgiĉeto ni tial petas aldoni la sumon de CHF 2.- por kovri tiujn kostojn.

Kun elkoraj salutoj
La estraro de SES

# Bilanco 31.12.2018

| | | Bilanco 31.12.2018 |
|---|---|---|
| **1010** | Poshtkonto (17-581 908-4) | 2 845,49 |
| **1011** | Poshtsxparkonto (92-7737-1) | 21 486,05 |
| **1012** | Librkonto (14-893 808-5) | 1 140,96 |
| **1090** | UEA konto sesa-v (88.40 eur je 1.1297) | 99,87 |
| **1100** | Inventaro | 1,00 |
| **1110** | Inventaro Novaj Libroj (La Birdoj 163; Sonril-Urcxjo 588, Fahrtrichtung Esperanto 160) | 7 336,80 |
| **1310** | Akcioj de AMIKUMU (7500 AUD je 0.70415) | 5 281,13 |
| | **Aktiva sumo** | **38 191,29** |
| **2000** | Transaj pasivoj (kotizoj 2019) | 565,00 |
| **2005** | Sxuldo SES-Informas | 400,00 |
| **2010** | Fonduso: Muzika konkurso | 2 896,17 |
| **2020** | Fonduso: JES | 3 211,85 |
| **2100** | Kapitalo 1.1.2018 34 636.92<br>Malprofito 3 518.65 | 31 118,27 |
| | **Pasiva sumo** | **38 191,29** |

| | | Jarkalkulo 2018 | Bugxeto 2018 | Bugxeto 2019 |
|---|---|---|---|---|
| **Elspezoj** | | | | |
| **3000** | Informado, varbado | 1 530,70 | 4 000,00 | 4 000,00 |
| **3010** | Omagxoj, laborrimedoj | 100,00 | 0,00 | 0,00 |
| **3020** | Subvencioj, premioj, projektoj | 700,00 | 1 400,00 | 1 000,00 |
| **3110** | Svisa Espero / SES informas | 2 337,50 | 4 100,00 | 3 000,00 |
| **3120** | Kunvenoj kaj kunsidoj (GK, estrara, regionaj) | 93,10 | 300,00 | 150,00 |
| **3200** | Kotizoj al UEA, EEU, ktp. | 270,00 | 250,00 | 270,00 |
| **3210** | Administrado (afrankoj, telefonkostoj, ktp) | 20,00 | 300,00 | 150,00 |
| **3220** | Bank- kaj poshtspezoj kaj kurzdiferencoj | 671,90 | 100,00 | 400,00 |
| **3330** | Libro eldonado | 0,00 | 7 000,00 | 7 000,00 |
| **3500** | Malvalorgio de la libro-stoko | 2 280,20 | 250,00 | 2 000,00 |
| | **Elspeza sumo** | **8 003,40** | **17 700,00** | **17 970,00** |
| **Enspezoj** | | | | |
| **4200** | Membrokotizoj | 2 620,00 | 4 500,00 | 5 000,00 |
| **4210** | Abono al SESi sen membreco | 0,00 | 600,00 | 600,00 |
| **4300** | Donacoj, heredajhoj | 1 310,00 | 4 500,00 | 3 400,00 |
| **4500** | Vendoj Libroj (Fahrtrichtung Esperanto 25, Sonril-Urcxjo 22) | 554,75 | 8 000,00 | 2 000,00 |
| **4600** | Bank kaj poshtinterezoj | 0,00 | 150,00 | 0,00 |
| **4800** | Diversajho Libro eldonado | 0,00 | 0,00 | 7 000,00 |
| | **Enspeza sumo** | **4 484,75** | **17 750,00** | **18 000,00** |
| | **Profito/Malprofito** | **-3 518,65** | **50,00** | **30,00** |

04.04.2018 Oxana Grazhdanova

# Svisa Kalendaro

## (eltiro, la kompletan svisan kalendaron vi trovas rete sub http://www.svisa-esperanto-societo.ch/kalendaro)

Helpu, ke via avento estos listigita en la Svisa Kalendaro sendante vian informon al ses-informas@esperanto.ch

### Majo 2019

2an de majo 2019, 16h00. Bielo en Migros-Restoracio Kreuzplatz: **Ronda Tablo de la Mondregistaro - Kreado de Espero-mono kun Parzival'**

4an ĝis 5a de majo 2019, Casa del Popolo, Belinzono: **Svisaj Esperanto-Tagoj**

5a de majo 2019, 14h00, Casa del Popolo, Belinzono: **Ĝenerala kunveno de Svisa Esperanto-Societo**

6an de majo 2018, 20h00; Laŭzano, Espace Dickens, rue Dickens 6: **Laŭzana Esperanto-Societo**, **Venu kune kanti karaokeaĵojn.**

9an de majo 2019, 16h00. Bielo en Migros-Restoracio Kreuzplatz: **Ronda Tablo de la Mondregistaro - Kreado de Espero-mono kun Parzival'**

9an de majo 2019, 18h00-22h30. Bielo en Voirie, Brunnengase 1: **Au Joli Mois de Mai - Ekspozicio de Parzival': Malarmigadhorloĝoj**

17an de majo 2018, 19h00; Laŭzano, Espace Dickens, rue Dickens 6: **Laŭzana Esperanto-Societo**, **babilaj rondo ambaŭgrupe, Monika kaj Giulio invitos nin.**

25an de majo 2019, 10h00-17h00: CDELI, Bibliothèque de la Ville, Rue du Progrès 33, La Chaux-de-Fonds: **Pedagogia studsabato kun Claude Gacon pri la efiko de lia didaktika afiŝaro**

25an de majo 2019, 18h30, Ĝenevo, rue de Montbrillant 20: **Kasta Festo, organizota de *La Stelo***

30an de majo 2019, 20h00. Zuriko, Restoracio Mjshjo apud la stacidomo Zuriko-Stadelhofen: **Libera kunveno de Esperanto-Societo Zuriko kaj kafoklaĉo aparte bonvenas lernantoj el Duolingo**

### Junio 2019

15an de junio 2019, 10h00-17h00, CDELI, Bibliothèque de la Ville, Rue du Progrès 33, La Chaux-de-Fonds: **Studsabato de CDELI** (**vidu pli**)

22an de junio 2019, 08h00-17h45, Ekveturo de la trajno en la stacidomo de Laŭzano: **Ekskurso 2019 de Laŭzana Esperanto-Societo, vizito de la firmao Camille Bloch en Courtelary** (prezo CHF 25,- + trajnbileto proprakoste)

27an de junio 2019, 20h00. Zuriko, Restoracio Mjshjo apud la stacidomo Zuriko-Stadelhofen: **Libera kunveno de Esperanto-Societo Zuriko kaj kafoklaĉo aparte bonvenas lernantoj el Duolingo** (**vidu pli**)

### Julio 2019

9an ĝis 14a de julio 2019, Kultura Centro Esperantista, Chemin des Postiers 27, La Chaux-de-Fonds: **Kurso pri literatura tradukado gvidas Perla Martinelli**

11an de julio 2019, 20h00. Zuriko, Restoracio Mjshjo apud la stacidomo Zuriko-Stadelhofen: **Libera kunveno de Esperanto-Societo Zuriko kaj kafoklaĉo aparte bonvenas lernantoj el Duolingo** (**vidu pli**)

13an ĝis 20a de julio 2019, Chachak, Serbio: **ILEI-Kongreso**

16an ĝis 21a de julio 2019, Kultura Centro Esperantista, Chemin des Postiers 27, La Chaux-de-Fonds: **Ateliero pri proza beletra kreivo**
**kungvidas Giorgio Silfer** (**vidu pli**)

20an ĝis 27a de julio 2019, Lahtio, Finnlando: **104a Universala Kongreso de Esperanto** (**vidu pli**)

28an de julio ĝis 4a de aŭgusto 2019, Liptovský Hrádok, Slovakio: **75a Internacia Junulara Kongreso de TEJO**

*(Tiu-ĉi listo ne estas kompleta, sed nur parta selekto!)*

## *Pedagogia Studsabato de Claude Gacond*
## *pri la instruefiko de lia didaktika afiŝaro*

*kun la helpo de Stefano Keller*






Por instruantoj kaj esperanto-progresantoj,
*sabate, la 25-an de majo 2019, 10h-16h, en la*
*Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI)*
*Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds.*

Prezentante sian afiŝaron, Claude Gacond klarigos ties uz-efikon. La partoprenantoj kunprenu sian komputilon (aŭ memorstangeton), por kopii la instrumaterialojn (afiŝaron kaj instru-konsilojn) por sia propra instruada uzo.

Post didaktika enkonduko, Claude Gacond instruos, kiel
- utiligi la afiŝaron cele al enkonduka instruado de esperanto,
- malkovrigi al interesatoj la funkciadon de esperanto,
- dum la enkonduka kaj perfektiga instruado de esperanto alporti necesajn gramatikajn kaj vortfaradajn precizigojn.



| | i- | ti- | ki- | ki- |
|---|---|---|---|---|
| -o | io | tio | kio | kio |
| -u | iu | tiu | kiu | kiu |
| -a | ia | tia | kia | kia |
| -a | ia | tia | kia | kia |
| -al | ial | tial | kial | kial |
| -am | iam | tiam | kiam | kiam |
| -e | ie | tie | kie | kie |
| -el | iel | tiel | kiel | kiel |
| -es | ies | ties | kies | kies |
| -om | iom | tiom | kiom | kiom |

La instru-materialo estas uzebla per prezento de presitaj afiŝoj, aŭ per projekciado sur tabulon.




*Interesatoj aliĝu al tiu studsabato kiel eble plej rapide, sin anoncante:*
- *rete:* esperanto@cdeli.org
- *telefone (9h30-11h30, 14h-16h):* 032 967 68 42
- *paperpoŝte:* CDELI, Bibliothèque de la Ville, Rue du Progrès 33, Case postale 219, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (NE), Suisse

Estos akceptitaj la 15 unuaj aliĝantoj. Partoprenkosto: CHF 25.- pagota surloke.

- *Alveno ekde 9h30*
- *Komuna tagmanĝo en apuda restoracio*
- *Post-studa teumo kaj libroservo je dispono ĝis 17h*

http://www.cdeli.org/eventoj/#2019pscg

www.cdeli.org/cours | www.cdeli.org/Esperantokurs | www.lernu.net | www.cdeli.org/libroservo




## Studsabatoj en CDELI

# *Malkovro kaj studo de esperanto*

*Por plenumi la bezonon praktiki la lingvon sub la gvido de atentaj pedagogo, la* ***Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI)****, fako de la Urba Biblioteko de La Chaux-de-Fonds, regule organizas studsabatojn, malfermitaj por ĉiuj. Ili estis organizitaj de Claude Gacond dum jardekoj, nuntempe gvidataj de Mónika Molnár, Nancy Fontannaz, Luc Allemand, Stefano Keller, Nicole Margot kaj Danielle Carrier.*

### *Datoj de la studsabatoj en 2019:*

19 januaro, 16 februaro, 16 marto, 27 aprilo, 18 majo, 15 junio,
21 septembro, 19 oktobro, 16 novembro, 14 decembro.

***3 studgrupoj****: komencantoj, progresantoj, supera nivelo.*

### *Aliĝo*

Por faciligi la organizon de la evento, la partoprenantoj ***anoncu sin ĝis la antaŭa mardo***, indikante siajn nomon, adreson kaj telefonnumeron, perrete: esperanto@cdeli.org - telefone: 021 728 31 27 (kun respondilo) aŭ 032 967 68 42 (CDELI).
***Kosto:*** Po 15.- svisaj frankoj por studsabato (senpage por studantoj).

### *Horaro de la sabatoj*

**10.00 : Malfermo de la salono de CDELI :** Eblas aĉeti novajn librojn : lernolibrojn, vortarojn, beletraĵojn, ktp, kaj tre malkostajn brokantaĵojn.

**10.20 : Oficiala malfermo** kaj formo de la studgrupoj.

**10.30 : Unua studperiodo.** Ĝenerale oni laboras en la salono de CDELI kaj en apudaj salonoj, kiujn la lernejo disponigas al ni.

11.30: Kafo-paŭzo.

**11.45 : Dua studperiodo.**

12.45 : Paŭzo por kune tagmanĝi en proksima restoracio. Ĉiu pagas sian manĝon surloke.

**14.15 : Tria studperiodo.**

15.15 : Te-paŭzo.

**15.30 : Kvara studperiodo.**

**16.30 : Konkludo de la renkontiĝo** en la salono de CDELI, kie eblas resti por babili teumante, kaj por aĉeti librojn, ĝis sia propra forirhoro.

**17.30 : Oficiala fermo.**

***CDELI-enirejo:*** Centra pordo norde de la domo de la Biblioteko (Progrès 33). Se la pordo estas fermita, sonorigu (CDELI-sonorilo) : iu venos malfermi. Supreniru ĝis la 2a etaĝo.

### *Por atingi la Bibliotekon*

La Biblioteko troviĝas ĉe la numero 33 de la strato Progrès. El la stacidomo ĝi atingeblas per la buso 304, direkto "Hôpital", 3-a haltejo: "Bibliothèque". Aŭtomobilistoj sekvu la ŝildojn vojmontrantajn "Bibliothèque". Bonvolu parki en la stratoj de la kvartalo, ne en la korto.

**Ni ĝojos renkonti vin kaj helpi en la praktikado de Esperanto.**
**Monika Molnar, Nancy Fontannaz, Luc Allemand, Stefano Keller, Nicole Margot, Danielle Carrier.**

*Sub la aŭspicio de Svisa Esperanto-Societo (SES) kaj de Svisa ILEI-Sekcio (SIS)*

*CDELI, Bibliothèque de la Ville, Rue du Progrès 33, CH-2300 La Chaux-de-Fonds, Suisse. Tél. +41 32 967 68 42*
***www.cdeli.org/cours | www.cdeli.org/esperantokurs | www.lernu.net***

Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

## Aliĝu al UEA, ĝi estas via asocio!

Vi demandas: „Kio aŭ kiu estas UEA?"

La respondo estas: „UEA estas ĝia membraro! Do vi!" Ne demandu: „Kion utilas al mi, se mi membras?", sed demandu: „Kion utilas al Esperanto, se mi membras!"
Se Esperanto por vi ne gravas, vi ne bezonas membri en UEA. Sed UEA bezonas vin por povi fari sian laboron favore al Esperanto kaj sen forta UEA la Esperanto-movado perdus sian voĉon kaj ligilon en nia mondo!

Reta aliĝilo:
https://uea.org/alighoj/alighilo

## Redaktaj informoj:

**SES informas** aperas 2-foje jare en februaro (redaktofino jan 31) kaj septembro (redaktofino aŭg 31)

**Svisa Espero** aperas 1-foje jaro en oktobro (redaktofino septembro 20)

**Respondeca redaktisto:**
**Dietrich Michael Weidmann**

**Redakta adreso:**
**SES informas / Svisa Espero**
**Allsprachendienst Esperanto GmbH**
**Archstr. 2, Poŝtfako 26, CH-8613 Uster 3**
**Tel. +41(0)44 251 50 25**
**Fakso: +41(0)44 261 04 79**
**Retpoŝto** ses-informas@esperanto.ch

## Novaĵo: ĜK 2019 de SES sekveblos en Instagramo

Vi ne povos ĉeesti fizike dum la ĝenerala kunveno 2019 en Belinzono? Sekvu ĝin rekte en Instagramo!
Kion vi devas fari por sekvi la kunvenon en Instagramo?
Nu, vi simple devas havi propran instagram-konton. Se vi ne jam havas instagram-konton, aliĝu sub https://www.instagram.com
Due vi devas aboni en instagramo la kanalon **DidiWeidmann**.
Trie vi devas instali la instagram-aplikaĵon en via poŝtelefono.
Kvare: Vi simple devas ĝustahore enŝalti instagramon en via poŝtelefono kaj iri al la kanalo DidiWeidmann. Se vi abonas la kanalon al vi estos montrate, ke nun videblas rekta video kaj vi malfermas la videotranssendadon.

(Videblos sur la kanalo DidiWeidmann la vespera programo de la 20h00 ĝis la 22h00 la 4-an de majo, la matena programo dimanĉe de la 10h00 ĝis la 12h00 kaj la ĝenerala kunveno inkluzive la ĥora kantado de la 12h00 ĝis la 16h00.)